Registered at G.P.O., Melbourne, for transmission by Post as a newspaper.

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio :
Box 731F, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj) :
Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj

Unu numero: 4 pencoj
Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 64 (Sixth Year) **Melburno** *(Melbourne)*, **Australio.** **10 oktobro 1925**

THE XVII CONGRESS.

The opening of the Congress took place on August 3rd, and was an impressive ceremony. The great auditorium of the Viktoriahalle was filled with the congress delegates and large numbers of people living in Geneva who followed the business of the evening with great interest.

The ceremony was opened by an organ prelude which broke into L' Espero, the anthem of the Esperantists. The congress delegates took part in this with great enthusiasm. Then the Congress was opened by the President of the Swiss Esperanto Society, s-ro Stettler (Bern), with a speech of welcome to the delegates. He alluded to the fact that this was the second international congress in Geneva and the third in Switzerland, and then recalled the main events of both the previous congresses. The Bern Congress of 1913 was the last international congress before the war and was also the last which the originator of Esperanto, Dr. Zamenhof, attended. The small number of delegates at this year's conference compared to its predecessors was due, the speaker said, to the unfavourable economic conditions in almost all countries. One might say that this conference had been opened under very favourable auspices. As the official representative of the Swiss Government and of the Canton of Geneva, M. Oltraniare, the Chief of the Department of Public Instruction of the Canton of Geneva, welcomed the delegates and communicated to them an important decision of the Government of Geneva. It is prepared to propose to the Swiss Federal Government that it should call an international conference to discuss the question of the introduction of Esperanto into schools as soon as this is desired by recognized circles. It would be the bridge from north to south and from east to west and the town would become one of importance for Esperanto. The speaker concluded his speech, which was in French by a few words of welcome in Esperanto. Then followed the traditional congress speech which, since the retirement of Dr. Zamenhof from the public Esperanto movement in 1912, has been given by Dr. Edmond Privat, the present president of the universal Esperanto Asocio. Dr. Privat is a brilliant speaker who has mastered the language in a way which always excites admiration, even among those who have previously attended these congresses. He spoke first of their late master, Zamenhof, who in 1906, almost at the same time and in the same place, had stood and professed his "linguistic faith." The speaker

also referred to the wife of the master, who had died last year and who had been an untiring helper of the originator of Esperanto. Out of respect for the wife of Dr. Zamenhof, who had attended all conferences since the death of her husband, the whole assembly rose. Continuing, Dr. Privat spoke of the importance of Esperanto as a means of securing international understanding. He drew comparisons between the League of Nations and the Esperanto movement, both of which had a common aim, the creation of a lasting peace between the nations and the progress of human civilisation. After this speech, which was received with loud applause, came the speeches of the official delegates. The first was the Vice-president of the International Red Cross, M. Desgouttes, who spoke in Esperanto. He described what an indispensable aid to the Red Cross Esperanto was. Then followed the German representative, M. Guerich, of the Ministry for the Interior in Germany. He said that the idea of Esperanto was at this moment finding favour with the German government. The German government was supporting the movement as far as possible. In many German schools optional instruction in Esperanto was already being given. This speaker also concluded his speech with a few words in Esperanto. Colonel Inglada of Madrid spoke as the representative of the Spanish government. S-ro Isbricker (The Hague) addressed the Congress on behalf of the Dutch government. The Polish government was represented by the attache to the embassy, Count Morsztyn. S-ro Fischer, a prominent merchant of Bucharest, spoke on behalf of the Rumanian government. The official speeches were concluded by a few words of welcome from M. Furukati of Japan in the name of the League of Nations, and from M. Tarelli of Italy from the International Labour Bureau. Then came the speeches in Esperanto of representatives of certain organisations. S-ro Morries (New York) spoke on behalf of the International League for a Universal Language, Colonel Delachambre (Paris), Director of the French Weather Bureau, spoke on behalf of it and of the Meteorlogical Institute. Dr. Freitag (Berlin) brought greetings from the German Society of Technical and Scientific Institutions. In conclusion, the representatives of Esperanto organisations of 31 different nations brought greetings from their societies, and included s-ro Feldmeyr, from Australia. These short speeches were particularly interesting for the non-Esperantists present, who were thus able to hear that in the pronunciation of Esperanto by representatives of different nations, scarcely any essential differences existed. As representative of the German Esperanto League, Dr. Voigt, a bank director of Stuttgart, also spoke. After a few concluding words by the president of the Congress, Dr. Privat, the audience dispersed fully satisfied with the events of the evening.

JOTTINGS FROM THE XVII CONGRESS.

The report of the opening of the Congress was kindly sent to the Editor by his friend, Mr. G. E. Green, M.A., of Melbourne, who is at present travelling in Germany, and who translated it from the "Berliner Tageblatt," a journal with very strong Esperanto tendencies.

The Delegates vizited the Labour Office of the League of Nations. They were received by s-ro Tarelli, on behalf of the Office, who explained, in Esperanto, the history and aims of the organisation.

The excursion on the Lake and the Costume Ball were fully enjoyed. One critic says " . . . the orchestra did not please music lovers." The music at all functions seems not to have been above reproach.

At the presentation of "Ginevra," the chief roles were played by German samideanoj, whose pronunciation was distinctly incorrect, for example "zoldatoj," instead of "soldatoj," "ĉ" instead of "ĝ," "p" instead of "b," and so on.

S-ro Grenkamp, probably one of the world's best Esperanto speakers, writes, in a report,—"I noticed that some of our most eminent colleagues now pay less attention to pronunciation than formerly. During the speeches we heard too often such errors as, ne'nion, ne'niu, spec'jale, ra'djo, e'fektive, etc. Would not the institution of a new section in the Akademio, dealing with pronunciation, be advisable?"

Prof. Th. Cart, president of the Akademio, hinted that on account of his age, he may soon retire from that position. It is to be hoped that his retirement will be long delayed. He is a staunch and much needed guardian of the fundamental purity of Esperanto.

A very small number of works were this year submitted to the Akademio and therefore, no prize was awarded. The Committee stressed the fact that "the style of our written language since the war shows lack of care." It recommends ". . . all to acquire the works of Dr. Zamenhof and to learn from him how to write clearly and agreeably. No amount of reading will equal the knowl lge of his originals and translations and no one has a right to assume that he knows Esperanto thoroughly if he has not endeavoured to acquire from that reading that spirit of our language that Dr. Zamenhof so forcefully described at the conclusion of his famous letter to Borovko."

It is agreed that the best and most impressive orator of the XVIIa is Dr. Olŝvanger, of Bern.

Rudolf Mosse, Berlin, publishers of the great daily, "Berliner Tageblatt," have decided to issue a cheap series in Esperanto, conditionally on ten thousand prepaid orders reaching them before the end of this year. Translations will be made from 20 to 25 languages. Each book will be of about 50 pages, and the cost of the complete series, including postage, is to be 20 Swiss fracncs.

S-ro Blaise reported regarding the U.E.A. He said that in Japan alone it had not secured a strong membership . "From another source" says a delegate, "we know what caused that condition. We learned it from many letters of our Japanese friends and from their Revuo. It is the result of the battle against "io." Our Japanese friends are as staunch to the Fundamento as the British."

On September 5 3LO transmitted a talk on Esperanto, with special reference to the using of Esperanto at European Congresses. The transmission was excellent. We congratulate 3LO on the result of their work. The speaker was Mr. R. R. Rawson, who announced that talks would be given on the first Saturday in each **month at 7.15 p.m.**

AUSTRALIAN ESPERANTO ASSOCIATION.

A meeting of the Victorian Section was held at the Melbourne Esperanto Society's room on Sept. 4. Those present were, Mr. Parker, Miss Holdensen (Iru Antaŭen Grupo); Mr. Drummond, Mr. Rawson, Melbourne Esperanto Club; Mr. Ballard, Miss Byatt, (Melbourne Esperanto Society); Mr. Byatt, (Persista Grupo). After reading the minutes of previous meeting, the secretary reported that the subscription to Konstanta Reprezentantaro had been paid to 30th June next; that the resolutions of the Melbourne Congress had been forwarded to the Postmaster General, to the Education Department and to the Chamber of Commerce. It was decided to recommend to other sections that the next Congress be held not later than Easter 1927. The feeling of the meeting was that Hobart should be the locale and Christmas time the season. It was finally decided that the secretary should write to Hobart, Adelaide and Sydney sections to ascertain their views, and explaining to the two former that, in the event of the Congress being held in their respective city, the organising work would be done by the A.E.A.

Mr. Byatt drew attention to the financial state of the A.E.A. and gave notice that at the next meeting of the Victorian section he would move, "That the matter of creating a capital fund be now considered." The meeting then adjourned to December 4.

RECEIPTS (SUBSCRIPTIONS).

Up till 1st October we have received the following sums, (the figures in brackets indicate the month and year to which payment is made): —R. J. Dodd, 10/- (5/26/); V. Newnham, 4/6, (4/26); E. Hanks, 9/-, (9/26); L. Laiho, 5/-, (5/26); H. Pudney, 30/-, (8/26); C. C. Dornbusch, 5/-, (6/26); L. Irwin, 4/6, (7/26); M. Purnell, 4/6, (6/26); "Amikino," (donaco), 5/6; H. N. Love, 4/6, (7/26); W. McPherson, 9/-, (9/26); R. Mitchell, 4/6, (9/26); I. Thomas, 4/6 (9/26); M. Martinek, 4/6, (6/26); **Coles Book Arcade, 30 (9/25).**

LA SUDA KRUCO.
MELBURNO.
Monata gazeto pri la Esperanta Movado.
Ni fosu nian sulkon.
Adresu ĉiujn leterojn, manuskriptojn, ktp. al "Box 731 F, P.O. Elizabeth St., Melbourne."
Abonojn oni povas sendi per poŝta noto en Aŭstralio, per poŝta mandato el Nov-Zelando kaj el ĉiuj aliaj landoj nur per internacia poŝta mandato aŭ per perfektaj, neuzitaj poŝtmarkoj de la lando, sendante la plej malmultajn pecojn (poŝtmarkojn) ĝis la necesa sumo. Ni ne donas specimenojn ekzemplerojn, kvankam ni vole sendos ilin kontraŭ perfekta, neuzita poŝtmarko, je valoro de kvin pencoj —duono de unu svisa franko.

THE A.E.A.

The Australian Esperanto Association is in need of funds; as at present constituted the organisation is practically powerless to carry on propaganda work of any kind, in its own territory owing to lack of money. Rightly or wrongly the last congress voted for the remission of £57 to the Universal Esperanto Association in Geneva. While the motive of the congress was good, one may be pardoned for questioning the wisdom of starving our own national organisation. Although the organisers of the 1925 congress, by good management, were able to show a substantial profit, there is always a possibility of a deficit in these affairs. The next congress is due in 1927 and the A.E.A. upon which devolves the duty of organisation, is in the position of having no funds for that purpose. In the event of a deficit the organising sub-committee will be personally liable. Obviously the A.E.A. should have been allowed to retain a certain amount as a capital fund. Prudence and ordinary business practice demand the creation of a stand-by nest egg. How this is to be done is a problem for consideration by the A.E.A. in the near future. Further, the establishment of a capital fund will provide the means for intensive propaganda work for Esperanto in Australasia, which is most essential and desirable, not only in the southern hemisphere but also in all English speaking countries. Nationally we are a conservative people, looking upon everything which appears to have a semblance of foreign influence behind it, with suspicion and distrust. When, however, something—Esperanto for instance—is launched, vouched for, and backed up by our own people, we accept it on its merits. Let us face the facts. Propaganda work on an appreciable scale, commensurate with the importance of the work is practically nil. A vast field lies open for the sowing and cultivation of the seeds of Esperanto. Shall we not be doing good work by spreading the knowledge of the international auxiliary language among people of all sections and beliefs in Australasia? Our schools, universities, libraries, churches, politics, commerce, and science are seed beds waiting for cultivation. Let us be practical. The present age is no time for dreaming; this country is no place for visionaries. Let us make Australia one of the leading countries in the world of Esperanto. In doing this we shall be doing exactly what the master linguist—Zamenhoff—did during his whole life. What greater tribute can we pay to his work and his memory?

EXAMINATION.

On Tuesday, October 27th, the Melbourne Esperanto Society will hold an examination for the B.E.A. diploma and preliminary certificates. Intending candidates are asked to notify the secretary, Miss V. Cox, not later than Friday, 23rd. The examination will take place at the club room of the I.K.A. Esperanto Club, Burwood Road, Glenferrie, near corner of Glenferrie Road, at 7.30 p.m. sharp.

LI SCIIS.

Antaŭ nelonge bone konata lerneja inspektoro en Viktorio ekzamenis knabinojn kaj demandis al ili kion signifas la vorto Esperanto? Nenia respondo. Stultulinoj! ĉu vi ne scias ke tiu vorto signifas elspiri? Ĉu vi ne komprenas ke la esperantistoj elspiras la internacian lingvon? Antaŭe ni opiniis ke espero signifashope. Kaj Esperanto—one who hopes. Sendube oni ĉiam lernas.

LETERO AL AMIKO EN EŬROPO.

—

Estimata samideano,

Via korespondanto, s-ro P. H. post kelsemajna veturado tra Afriko, laŭ sia programo nun vojaĝas en Suda Ameriko. Antaŭ lia foriro mi promesis lin, ke mi de tempo al tempo, skribos al vi.

Vi ĉiam estas interesata koncerne niaj indiĝenoj, tial mi skribos ion pri ili. S-ro Lance Le Soeuf multe vojaĝis en la dezertoj de Aŭstralio kaj funde konis la nigrulojn kaj iliajn morojn. Li diras, ke la scienculo metas la nigran Aŭstralion sur la plej malsupran ŝtupon de la homaro. Li estas vagulo, kiu havas nenian ideon pri la akiro de siaj vivrimedoj, krom tio, kion li povas trovi dum siaj iradoj. Ekzemple, en la norda parto de Aŭstralio, dum la altaj tajdoj grandnombraj fiŝoj estas portataj en la maraj akvoj, kiuj saltas super la marbordaj rokoj. En la varmega somero la akvoj sekiĝas kaj la fiŝoj estas lasitaj en bone salita stato. La indiĝenoj scias, ke en certaj sezonoj ili trovos tiujn salitajn fiŝojn, sed ili ne metas ilin en konservejon. Ili nure festenas dum periodo, kaj forvagas, postlasante sufiĉe da nutrado por armeo. Estas mirinde, kiamaniere la nigruloj trovas sian nutraĵon. En sudorienta Aŭstralio la "King Mallee," speco de eŭkalipto, kiu en aliaj lokoj estas nura arbeto, atingas la altecon de 40 ĝis 50 futoj. La radikoj etendiĝas malprofunde en la teron. El tiuj radikoj la indiĝeno faras sian manĝaĵon muelinte ĝin en specon de faruno. Alia speco de faruno li faras el la semoj de la "mulga" arbeto. Ĉi tiuj semoj tre similas mallarĝajn vitrajn perlojn. La indiĝenoj estas tre observemaj. Ili studas ĉiun blankulon, kiun ili vidas por la unua fojo, por ke ili poste povu mimiki lin por la edifo de la gento. . Ili komunikas inter si, trans longaj distancoj, per kio estas efektive la semafora signala sistemo de la blankuloj.

S-ro Le Soeuf parolis nur pri la indiĝenoj, kiuj libere vagas en tiuj partoj de Aŭstralio, kie ĝis nun la blankuloj tre malofte iras, kaj nenion diris rilate al tiuj nigruloj, kiujn la misiistoj instruis pri religio, kaj la labormetodo de la blankulo. Mi ĵus legis raporton pri la misia bieno, ĉe Yarrabar, proksime al Cairns, urbo sur la nord-orienta marbordo de Kvinslando. Tie, sub la gvidado, de la misiistoj, la indiĝenoj mem konstruis sian preĝejon, kaj funkciigas grandan segejon, kiun ili mem instalis. Ili povas ripari iujn difektojn de la maŝinaro, bone manovras la motorboaton kaj, mallonge, faras ĉion, kio devas esti farata, tiel bone kaj efike kiel farus komunumo de angloj. Estas aliaj bienoj, ĉe rivero Mitchell, Kvinslando; rivero Lockhart, Kvinslando; Morgumber, kaj rivero Forrest, Okcidenta Aŭstralio; ĉie la sperto estas la sama—se taŭge instruata la indiĝeno estas bona lernanto. Estas tre evidente, ke lia cerbopovo estas sufiĉe granda ebligi lin lerni ĉiujn "artojn de la paco." En "La Suda Kruco" vi jam antaŭe legis pri David Unaipon, kiu lekciis en multaj urboj de Aŭstralio. Alia geniulo, inter la indiĝenoj, estas James Noble, kristano el la regiono de Rivero Forrest. Noble antaŭ nelonge estis solenigita kiel pastro de la Angla Eklezio, kaj li estas la unua aŭstralia indiĝeno atingi tiun rangon. Li estas belforma, atleta homo, pli ol ses futojn alta kaj tre maltima en ĉiu danĝero. Li havas bonan influon sur la senhejmajn vagulojn, kiuj de tempo al tempo forlasas la sovaĝejojn kaj fiagas kontraŭ la pionirajn koloniistojn. Mildaj kaj noblaj estas liaj vizaĝtrajtoj, spegulante la noblecon de lia animo. Mi forte bedaŭras, ke mi ne povas sendi al vi lian portreton. Salutas vin amike, Carlo Madrigalo.

HAROLD PUDNEY **Specialisto pri Fontanplumoj.**

Se vi havas kriplan fontanplumon, kiu malhelpas vian skribadon portu ĝin al li, kaj li malkare rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontanplumon POR VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facila por via monujo. Li speciale prizorgas mendojn per poŝto. Memoru la adreson

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

KRONIKO.

—

BRISBANO, Kvinslando. — Amiko skribis: Bedaŭrinde novaĵoj malofte okazas, ĉar nia afero neniel sukcesas nuntempe, spite la klopodo de kelkaj anoj. Dum la milito kaj post la milito la afero grave malfortiĝis. Tamen oni esperas, ke en la estonteco ĝi denove fortiĝos, kiel en la tagoj antaŭ la milito. En tiu ĉi jaro la sorto tre forte frapis nin. La morto forportis tri el niaj pioniroj, en aprilo f-inon Fraser, nian prezidantinon, en majo s-ron Schoch; en junion, s-ron A. E. Mason-Beatty, prezidanton,—tri fervoraj kaj spertaj Esperantistoj de multe da jaroj.

S-ro Schoch dum dek ses jaroj estis la Svisa konsuelo en Brisbano. Li loĝis en Brisbano kvardek jarojn, el tiuj li estis instruisto dum dudek kvin jaroj ĉe la Brisbana Teknika Kolegio. Li ĉiam estis fervora Esperantisto kaj post sia eksiĝo el la Kolegio li denove laboris por Esperanto laŭ sia eblo.

S-ro Mason-Beatty estis tre talentoplena homo. Laŭ profesio li estis kalkulisto kaj sekretario, kaj estis ano de la tri gravaj Aŭstraliaj Kalkulistaj Asocioj. Li tre amis la muzikon kaj estis vic-prezidanto de la Muzika Societo. Li estis sperta ludanto de la violonĉelo. S-ro Mason-Beatty prezidis la Duan Aŭstralazian Kongreson de Esperantistoj en Melburno.

"En Brisbano, Esperanto iom pli vigliĝas de la tempo kiam alvenis s-ro D. B. Thomson, el Melburno," diras korespondanto. "Ĉiusabate kaj dimanĉe oni havas eksterdoman kunvenon kaj estas gvidata klaso. Oni intencas lui konstantan ejon por klubo. ESPERANTO—FOUR
Antaŭ kelke da tagoj mi renokontis s-inon Dunne, el Melburno."

WEST IPSWICH, Kvinslando. — Estas starigita klaso sub patronado de la Eduka Asocio de Laborantoj (Workers' Education Assn.) La sekretario estas s-ro Phillip Barr.

SIDNEJO, N.S-K. — "Dante, Shakespeare, Zamenhof" estis la titolo de interesa alparolo de S-ro A. M. Davidson en la ĉi-tiea klubo dum lasta monato. Komparoj, malegalecoj kaj pensoj de tiuj famaj viroj estis klarigitaj de la parolanto en facile komprenebla maniero. Semajnon poste kvar membroj prezentis teatraĵan ellegadon el "Hamleto" (akto V, tombeja sceno). S-ro F. Taylor ludis la rolon de Hamleto, s-ro V. Rutland tiu de la unua tombisto, s-ro H. Torr kiel dua tombisto kaj s-ro H. Whyte-Meach estis Horacio. Stopigitaj papersaketoj surpentritaj kun groteskaj desegnoj servis kiel kranioj. Alia vesperon s-ro D. Healy parolis angle pri "La Utileco de Esperanto." Li citis ekzemplojn kie du aŭ pli lingvoj estas ĉiam uzataj, donis multajn malpli konatajn faktojn kaj montris sian subtilan humoron per oftaj ridemaj flankrimarkoj. Dum ĉi—tiu kunveno la membroj havis la plezuron saluti bonan konatulon el Sud-Aŭstralio, s-ron W. L. Waterman, kiu troviĝis sin en Sidnejo nur dum du tagoj. Nature s-ro Waterman devis paroli pri Adelajdo kaj en mallonga parolado li skizis kiel Esperantaj aferoj staras en tiu bela "ĝarden-urbo."

ADELAIDE, Sud-Aŭstralio. — S-ro C. A. Urlaub, kunagante kun la C.O. P.E.C. asocio, instruos tagajn kaj vesperajn kursojn.

MELBURNO, V. — Ĉe la Melburno Esperanta Asocio la plej interesa ero en la Septembra programo estis la debato. La elektita temo, "Ĉu la virinoj devus fumi?" incitis la anojn esprimi siajn verajn pensojn pri la temo, tre vigle kaj lerte, kaj preskaŭ ĉiu parolis kontraŭ la kutimo.— Je la ceteraj kunvenoj la anoj rakontis anekdotojn, kaj ĝuis instruan ludon per la helpo de la nigra tabulo. En la fina kunveno de la monato la anoj sin ekzercadis en la traduko de anglaj idiotismoj.

LIBROJ RICEVITAJ.

—

SVISLANDO—TURISTA KARTO, Svisa Fervojo Federala Publikiga Servo, Bern. Esperanta teksto surdorse. Petu senpagan kopion.

INVITO al al Aŭtuna Foiro, Frankfurt, 4-7 Okt. Alvenis Aŭstralion tro malfrue esti utila al iu.

LA MALAPERINTA AMIKO, aŭ la Nedaŭraj reenkorpiĝoj en Mantes. Aldona kontribuo al la pruvaro pri l'identeco de la Spiritoj. Prezo 5 fr. fk. Havebla de la aŭtoro, s-ro Jules Thiebault, Carignan, Francujo.

LA EVOLUO DE LA LEIPZIG' A FOIRO, Paul Voss, Leipzig, 32 paĝoj, kun bildoj kaj ornama kovrilo.

FARMACIO kaj ĤEMIO, Esperanta Grupo en Tojama Farmacia Kolegio, Tojama, Japanujo. 32 paĝoj, abonprezo 0.75 sv. fk.

ORIENTO, No. 1. Esperanta Eldona Kompanio, "Orienta," Novij-Gorod, P. O. Box 35, Harbin, Manĝurio. Prezo, kun afranko, 1.20 Yen.

Vidu paĝon 17 en "La Suda Kruco" de septembro. La enhavo de tiu-ĉi ekzemplero estas—Historio, sociala fako, etnografio, literaturo, biografioj, komerco, bibliografio. Estas dekok paĝoj de ilustraĵoj.

ESTAS, DO, EN KRISTANISMO IO VALORA. Vera rakonto, de sinjorino Walter Searle. Esperanta Kolportista Asocio, 64 St. Thomas' Rd. N., London, Anglujo.

S-RO. VITOŜINSKY.

"Kia plezuro uzi nur Esperanton por interparoli kun alilandanoj! Ja estis la unua okazo, ke ni, la Nagasaki Esp. Klubanoj, havis gastojn, kiuj parolas la karan lingvon. La gastoj estis Ges-roj Vitoŝinsky, la rusaj samideanoj el Harbino, kies nomon vi eble vidis sur la vojaĝa raporto de s-ro Ossaka en la Revuo Orienta lastan jaron. Ili antaŭe sendis al ni leteron en kiu estis skribite, ke ili restados kelkojn tagojn en Nagasaki por ekvojaĝi al Aŭstralio. S-ino Vitoŝinsky estas tre ĉarma. Ŝia edzo ankaŭ estis bona parolanto de Esperanto."

La supra estas raporto el Nagasaki, kiun presigis la "Revuo Orienta. Post alveno en Aŭstralio, s-ino Vitoŝinsky tre grave malsaniĝis kaj s-ro Vitoŝinsky ne povis trovi daŭran okupon. S-ro Vitoŝinsky estas komizo, sed volas trovi laboron sur bieno. Iaokaze, li ne estas elektema ,li faros ian honeston laboron por gajni vivrimedojn. Se kvinslanda aŭ alia samideano povas helpi, li bonvole skribu al nia administrejo.

AŬSTRALIOJ RADIANOJ ALPRENAS ESPERANTON.

Dum Aŭgusto okazis en Perth, Okcidenta Aŭstralio, jarkunveno de la "Wireless Institute of Australia" reprezentante la tutan aŭstralian radianaron. Delegitoj el ĉiuj ŝtatoj partoprenis kaj multaj gravaj decidoj fariĝis. Unu el tiuj estis al alprenon de Esperanto "kiel oficiala internacia lingvo." Longa diskuto ne okazis, la delegitoj evidente sciante sufiĉe pri la disvastigado inter iliaj kunlaborantoj alilanden por certigi la saĝecon de tiu propono kaj sen unu kontraŭdiro ĝi estis akceptita.

Aŭstraliaj Esperantistoj nun atendas la efektivan uzon de la lingvo kun aliaj kontinentoj. Jen okazo por diversaj filioj de la Internacia Radio-Asocio komuniki kun ni perradie en nia ŝatata lingvo. [F.T.S.]

ALVOKO.

De Elmigronto Aŭstralion.

Karaj orientaj gesamideanoj!

Vi ĉiuj scias mian nomon, kiel tiun de fervora propagandisto kaj honesta homo, kiu, loĝante kaj laborante en Tokio dum 2½ jaroj kaj nun en Ĥinujo, neniun trompis, neniun hontindaĵon faris. Nun venis tempo, kiam la sorto severe ordonas al mi decidi: ĉu mi devas reveni Siberion por tiea mizera malsata vivaĉo kaj esti tie ĉiam suspektata kaj persekutata, aŭ ĉu enmigri Aŭstralion kaj tie, fariĝinte laboristo, akiri monon por "Esperanto-farmo," kaj poste, altirinte aliajn samideanojn, aranĝi etan Esp. kolonion. Mi jam ricevis permeson de Aŭstralia Registaro eniri la landon, sed por la vojaĝo mi bezonas 250 jenojn por mi, 250 j. por mia edzino kaj 125 j. por mia filo, sume 625 jenojn. Mi jam havas 250 j. por mia bileto, kiun monsumon mi akiris, malsatante; 250 jenojn prunte donas unu rusa amiko, instruisto, kiu ankaŭ kunveturas tien kaj kiu helpas ankaŭ al du familioj Mankas ankoraŭ 125 jenoj por la bileto de la filo. Miaj edzino kaj filo multe toleris en Siberio dum mi vivis en Tokio. Nun ili devas retoleri en okazo, se mi devos reveni en Siberion. La sola espero estas, se vi ĉiuj, mem malriĉaj, helpos al mi, pruntedoninte po iom ajn: vi estas multenombraj, kaj se 120 personoj sendos po 1 jeno, mi havos la mankantan sumon, kaj mi solene promesas redoni al ĉiu sendinto duoble (100%). Samtempe tio montros la fortecon de nia interna solidareco kaj sento de reciproka unuiĝo. Mia adreso estas ĝis majo "Peking, Pekina Esperanto-Kolegio, al I. Serišev" poste "Harbin, Novij-Gorod, P. O. Box 35, al I. Serišev."

Samideane kaj frate

I. Serišev, instruisto de Esp. en Pekino.

[En Revuo Orienta.]

GAZETOJ RICEVITAJ.

Amikeco, 6, 7-8; Brazila Esperantisto, 4-6; Bulgara Esperantisto, 11-12; Bulteno Antverpena 7; Daylight, 8; Esperantista Junulаro, 27-27; Fluganta Skribilo, 37 (kun propagandilo "Fariĝu Stenografisto"); Heroldo de Esperanto, 56 ĝis 65; Literaturo, 27; La Unuigita Tuthomaro, 8; Le Monde Esperantiste, 139; La Interligilo de l'P.T.T., 34; Litova Stelo, 4, 5, 6, 7; Libera Laboristo, (Artur Bolle, Tresckowstr. 58, Berlin N. 58) jaro 1-a, no. 1; La Orienta Lumo, Oficiala organo de la Korea Esperanto- Instituto, 25 Heido, Seoul; jaro 1-a, no. 1; Oomoto, 7; Pola Esperantisto, 6-7; Revista del Ateneo, 12; The British Esperantist, 245.

OUR SUPPORTERS.

S-ro H. N. Love, Hendra, Brisbane, skribas,—Mi sendas mian abonon al "La Suda Kruco.' ' Mi estas surprizita de la raporto de la lasta kongreso, en kiu, iuj provis ĉesigi la publikigadon de "La Suda Kruco," kaj nun mi certe estas dankema, ke ili ne sukcesis. La komenco estas ĉiam la plej malfacila en ia movado. En la estonto sendube la gazeto estos inda je la unuaj penoj. La afero en Aŭstralio certe meritas ilon por publikigi nian aferon. Tiun ĉi "La Suda Kruco" efike faras. Mi multe ŝatas la artikolojn, kiuj regule aperas, en kiuj oni priskribas naciajn aferojn en Aŭstralio. En tiuj, multaj vortoj estas uzataj, kiujn oni ne povas trovi en ordinara vortaro, kaj kiuj estas uzataj nur en Aŭstralio, eĉ kelkaj el ili havas nesimilajn signifojn kontraŭ la vortoj uzatoj de aliaj angleparolantaj popoloj..
"The Suda Kruco."

S-ro E. S. Hanks, Coburg,—Mi sendas mian abonon ĝis septembro 1926. Kun ĉiuj bondeziroj.

S-ro Walter McPherson, Gisborne, writes "Enclosed is my subscription for the ensuing year. Wishing success and increasing circulation to

---

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro C. W. Ballard; sekretariino f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Hardware Club Chambers, 350 Little Colline-str., vendrede vespere, je la oka horo.

Hobarta Esperanta Grupo. Kunvenejo: Eaton-Bray-lernejo, Davey-str. ĉiun duan mardon, 7.30 vespere. Prezidantino F-ino C. M. Hannaford. Sekretario kaj poŝta adreso F-ino A. Beckett, 177 Davey-str:, Hobart.

"Iru Antauen"-Grupo. Prezidantino: S-ino E. S. Bigelow. Sekretario, S-ro J. Parker. Poŝta adreso, Warrigal Rd., Oakleigh. Kunvenejo: 36 Kangaroo Rd., Oakleigh, marde vespere, je la oka horo.

"Nigra Cigno"-Grupo. Prezidanto S-ro E. J. Goody, Sekretariino F-ino F. Cherrett. Poŝta adreso, 46 Leonard str:, Victoria Park, W.A. Lernantoj kunvenas Ĉe Perth Academy, 8 horo, merkrede; progresintoj, 277 Hay-str: 8 horo lunde.

Persista Grupo, Armadale, Melburno. Prezidanto: S-ro H. Byatt, Sekretariino: F-ino I. Thomas, Kunvenejo kaj poŝta adreso, 37 Brunel St., East Malvern, merkrede vespere, je la oka horo.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun ĵaudon de 7.45—10 ptm. ĉe "Rawson Chambers," Rawson Place (5a etaĝo, ĉambroj 580-583). Ĝuste apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: S-ro F. V. Taylor; Sekretario: S-ro L. E. Pfahl, 150 George's River Road, Croydon Park, Sydney.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

—— Send for ——

"THE RAINBOW," Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU.

Printed for the Proprietors, The Australasian Esperanto Association, Hardware Club Chambers, Little Collins Street. Melbourne, by McLean Publishing Co., Oakleigh.